

# Informa bulteno de la Esperantista klubo en Brno

Majo 1930

N-ro. 1

*Por membroj la bulteno estas senpaga, sed ĉiu estas petata doni libervole ian sumon por kovri niajn elspezojn. Kiu deziras poŝte ricevi la bultenon, devas pagi almenaŭ la poŝtelspezojn*

Ne rigardu la eksteraĵon de nia informa bulteno, ne rigardu la nombron de l' paĝoj, sed tralegu niajn komunikojn kaj poste pripensu. Pripensu, ĉu ni estis pravaj, decidinte havigi al ni rimedon – certe modestan, sed eble ĝuste pro tio tre efikan – por konservi kaj vigligi la kontakton de niaj klubanoj kun la Esperantista movado, por doni novan instigon al la laciĝantaj kaj novan entuziasmon al la malesperemaj. Eble ni sukcesos regajni al la Esperantista movado tiun aŭ alian eks-klubanon; en tiu okazo nia entrepreno estus jam pravigita. Sed krom tio ni volas ankaŭ servi niajn klubanojn, kiuj eble ne havas okazon aŭ eblon legi la internaciaj Esperanto-gazetojn. Ni volas doni okazon al niaj membroj kaj amikoj ne nur en la klubo, sed ankaŭ hejme ekzerci sin en la bela „verda lingvo“. Pripensu niajn intencojn kaj poste diru, al ni, ĉu vi aprobas nin. Se vi havas bonan ideon, donu al ni vian konsilon. Se vi volas kunlabori, vi estos bonvena, viaj artikoloj ĉiam estos akceptataj dum la klubaj kunvenoj kaj, se iel nur eble, estos publikigitaj. Ne timu, ke via stilo eble ne estas la plej pura. Ni zorge tralegos ĉiun artikolon, ĉiun noton ricevitan kaj korektos ĝin. Kaj nun al la laboro.

Enkomputiligis: Bohumila Trzosová, 2010-02-23, Brno

Ĉar kiel Zamenhof diris:

„Ni ĵuris batali, ni ĵuris labori!“

El la klubo vivo

La ĝenerala kunsido okazinta la 8an de Aprilo 1930 elektis jenajn gesamideanojn en la estraron:

S-ino Marie Strejčková, f-ino Marie Vodáčková, s-roj: Rudolf Nečas, Adolf Nečas, Josef Vondroušek, Jiří Šamla, Jan Poláček.

La revizoroj: Sroj František Baďura, Dro Žák.

La elstara kunsido okazinta la 24. IV. 1930 jene disdonis la funkciojn: Prezidanto: J. Vondroušek, vicprezidanto: R. Nečas, sekretariino M. Vodáčková, kasisto: J. Poláček, bibliotekisto: J. Šamla, asesoroj: M. Strejčková, A. Nečas.

Krom la oficialaj funkcioj estis ankaŭ dispartigitaj la efektivaj taskoj, por ke ekfunkciu la klubo laŭcele kiel stabo de laborantoj por la internacia lingvo. Specialan atenton oni decidis doni al la klubo kaso, por ebligiper donacoj, kolektoj kaj aliaj enspezoj akiri tiom da mono, ke grandstila propagando povu esti farata. La estraranoj spontane donacis en la unua kunsido Kĉ

120.- kaj du konstrulotojn (stavební losy). Jen la listo de l' unuaj donacoj: S-ino Strejčková, Kč 50.-, s-ro Baďura Kč 20.-, s-roj Nečasovi 2 konstrulotojn po unukvinono, s-ro Vondroušek Kč 50.-, s-ro Poláček Kč 30.-, s-ro Sonnenfeld Kč 50.-. Ĉiuj promesis laŭeble ankaŭ plu donaci. Gesamideanoj, ankaŭ vi ne forgesu, ke sen mono nenia propagando povas esti farata. Faru ankaŭ vi oferon kaj donacu laŭ via kapitala forto Kč 10.-, Kč 20.-, Kč 50.- aŭ pli. El tiu estrara (komitata) kunsido rezultis ankaŭ la fondo de la „Informa Bulteno“, kiu espereble fariĝos ligilo inter Brnaj Esperantistoj kaj reaktiros multajn per aktiva laboro en la Esperanta movado.

EDZIGO: S-ro Jan Jelínek, longjara aktiva nia kunbatalanto kaj klubano edziĝis la 28an de Aprilo kun f-ino Hedvika Mrázová. Kelkaj samideanoj partoprenis la edziĝan solenon, dum kiu pastro preĝis „Patro nia“ en esperanto. Ni kore gratulas nian membron kaj deziras longedaŭran, neniam finiĝontan feliĉon.

### Novajoj el la Esperanta Movado.

ESPERANTO OFICIALA LINGVO DE LA BULGARA POŝTO La bulgara ĝenerala Direkcio de poŝto, Telegrafio kaj Telefonio, jam antaŭe favorinta Esperanton, lasttempe ĝin oficialigis. La Direkcio subvencias kurson de Esperanto en Sofia.

ŜTATA OFICEJO ARANĜAS ENKETON PER ESPERANTO. La stenograficejo de la hungara parlamento organizas enketon pere de Esperanto. La oficejo dissendas demandaron en Esperanto redaktitan, al ĉiuj parlamentaj stenograficejoj de la tuta mondo. La ricevota materialo estos eldonita en hungara kaj Esperanta lingvoj. La oficejo havos kunlaborantojn en multaj ĉefurboj. Stenografistoj, kiuj deziras kunlabori, skribu al Stenograficejo, s-ro Kökeny, Budapest V. Parlamento.

LA KOMPONISTO DE LA ESPERANTA HIMNO MORTIS. Post la morto de s-ino Marie Hankel en Dresden kaj de generalo Sébert en Parizo, la komuna al ni ĉiuj sorto forrabis ankaŭ Baronon de Ménil en Neuilly-sur-Seine (Francujo), komponiston de la „Espero“. Li estis fervora laboranto por Esperanto kaj restos al ni neforgesebla. Lia morto kaŭzos granda doloron ĉie en la Esperantaro.

TRAMVOJISTOJ en DÜSSELDORF, scipovantaj Esperanton, portas rubandon kun surskribo: „Esperanto parolata!“ Iom post iom oni komencos do kompreni, ke oni bezonas Esperanton en la Internacia komunikado.

UNUA ESPERANTA PRESSPROCESO. En Hungarujo oni kondamnis socialistan Esperantiston, ĉar li tradukis revoluciajn kantojn en Esperanton kaj, kie la akuzo asertas, donis pli akran senco al la tekstoj.

FORD PRI MONDLINGVO. En la intervjuo kun Association Press (Asocia Preso – la plej granda Usona gazetinforma entrepreno), Ford, la mondkonata aŭtomobilfabrikisto, deklaris, ke universala lingvo estas la plej granda garancio por antaŭmalhelpi militon kaj staras en la unuaj vicoj kiel ilo por disvastigi tutmondan scion.

SVEDUJO OFICIALE SUBTENAS ESPERANTON. La sveda parlamento (unua kaj dua ĉambroj) unuvoĉe kaj sendiskute decidis kiel lastjare asigni 2,900.-- svedajn kronojn al porinstruistaj Esperantokursojn aranĝotajn de la svedaj instruist-unuiĝoj.

ESPERANTO ĈE PANEŬROPA UNIO? BRNO. Ĉe Paneŭropa Unio, Brno s-ro Hawla komencis kurson kun ĉirkaŭ 20 partoprenantoj.

-----  
Ni petas vin, donu al ni vian opinionon, kio plaĉis al vi kaj kio ne plaĉis al vi en la Bulteno.  
-----

### T r a d u k a t e k s t o

Traduku la jenan tekston en Esperanton kaj transdonu ĝin al la redakcio de la Bulteno. La plej bona teksto estos publikigita kun eventualaj lingvaj rimarkoj.

Cestující po Haliči ubytoval se v kterémsi hostinci. O dvanácti hodinách v poledne přijde pro něho hospodský a vzbudí ho řka: „Vstaňte, je čas k obědu!“ - „Dnes nemám jaksi chuti,“ odpovídá cestující. Hospodský na to: „Ale já potřebuji prostěradlo, abych přichystal na stůl.“

### ----- H u m o r o. -----

Aĉetanto: „Ĉu tiuj-ĉi ŝuoj longe estos porteblaj?“

Vendisto: „Longe porteblaj? Nu, sinjoro, neni ankoraŭ revenis por aĉeti duan paron.“

Sorĉisto (al la knabo, kiun li vokas al la scenejo):

„Nu, knabeto, vi neniam vidis min antaŭe, ĉu ne?“

Knabo: „Ne, paĉjo.“

### L i t e r a t u r o .

Okuloj viaj du.

Briletis kiel gemoj  
Okokuloj viaj du  
El ili disradiis  
La ĝojo kaj la ĝu'.

Mi amis, ho, freneze  
Okulojn viajn du.  
Sed ĝojon, ĝuon al mi  
Ne donas ili plu.

Animon vian montris  
Okuloj viaj du  
Al via koro gvidis  
La voj' tra okultru'.

Alian nun karesas  
Okuloj viaj du.  
Ĉu ankaŭ vi penetras  
En vian koron, ĉu?

Aŭ ĉu jam eĉ ne estas  
La ĝuo, sed enu'  
Al kiu nun kondukas

Okuloj viaj du?

E. Sonnenfeld

-----

Z a m e n h o f a j v o r t o j

Sed ĉu vi aprobas mian opinion aŭ ne, ĉu vi volas labori laŭ la postuloj de la verda standardo aŭ ne – mi ne dubas, ke en la profundeco de viaj koroj vi ĉiuj sentas la verdan standardon, vi ĉiuj sentas, ke ĝi estas io pli, ol simpla signo de lingvo.

Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano, kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absoluta nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo.

Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro, kaj en tio ĉi konsistos la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj.

-----  
====

-----  
-----  
La „Informa Bulteno“ aperos kelkfoje dum jaro, laŭbezone. Redaktoro: Ernst Sonnenfeld.  
Eldonanto: Esperantista klubo en Brno, Veverí 28. Hektografas Alois Strejček.

La duan parton enkomputiligis Miroslav Malovec, 2014-04-10.